

Raporto de AGEI, Landa Sekcio de ILEI por 2016

Bonvolu legi la aldonitajn konsilojn pri plenskribo. Limdato por raporti: Mar 31, 2017. **Nomo**

kaj mallongigo en Esperanto:

Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj / AGEI

Nomo kaj mallongigo nacilingve:

_____ X sama kiel pasintjare

Jaro de fondo / Jaro de aliĝo al ILEI:

_____ / _____ X sama kiel pasintjare

Jura statuso:

_____ X sama kiel pasintjare

Se la sekcio havas juran registriĝon, bv. doni la lokon, instancon kaj daton de tiu registriĝo.

Rilato kun Landa Asocio de UEA:

_____ X sama kiel pasintjare

Ekz.: ĉu integra parto, en kunlaboraj rilatoj aŭ plene sendependa de ĝi? **Membro-nombro**

fine de 2016:

Sume: 72_64+8_. Detale: paperaj _60_ retaj _8_ aliaj (1 HM)_1 DM + 3 familiaj membroj. Bv.

informi nin se vi havas enlandajn membrojn, kiuj ne apartenas al ILEI-internacia.

3 familianoj kun sama adreso, kiuj ne pagas plenan membrotizon kaj ne ricevas IPR de ILEI, do la landa listo enhavas 72 membrojn.

Nombro da rajtigitaĵoj / nomumitaĵoj komitatanoj por 2016:

_____4_____. Per aparta deklaro vi nomumu ilin!

(kalkulu laŭ membronombro fine de 2012: 5-14: **1**; 15-34: **2**, 35-49: **3**, pli ol 50: **4**.)

Retejoj kaj kontaktiloj sekciaj:

Oficiala hejmpaĝo: <http://esperanto.de/agei> Oficiala ret-adreso: zsafia.korody@esperanto.de

Ĉe la retadreso bv. diri al kiu funkciulo ĝi indikas. Se vi havas retejon, kiu prizorgas ĝin: *Zsófia Kóródy* kiomofte vi ĝisdatigas ĝin: *laŭ bezono, se estas gravaj novaĵoj aŭ gravaj ŝanĝoj* kiujn planojn vi havas ampleksigi ĝin? Ni foje-foje aldonas lernmaterialojn kaj instru-rilatajn broŝurojn Se ne, ĉu vi planas lanĉi retejon? Ĉu vi farus tion, se vi havus teknikan helpon de aŭ pere de ILEI?

Ĉu via sekcio havas retgrupon: _____jes_____

Se jes, ĉu vi pretas permesi al la internacia ILEI dissendi rekte mesaĝojn al viaj membroj? *ne*

Se ne, kiel vi plusendas al viaj membroj mesaĝojn de ILEI? *prezidanto de AGEI, Zsófia Kóródy plusendas mesaĝojn al la listo. Mi plusendas ĉion, kio rilatas al aŭ estas grava por enlanda instruagado*

Se via sekcio eldonas fizike presatan aŭ retan bultenon, bv. doni ĝian nomon, redaktoron, retadreson, oftecon kaj amplekson.

Enlanda membrokotizo:

25 EUR, pro la altigita ILEI-kotizo ekde 2012 restas 5 EUR/membro por landa agado

Se la enlanda kotizo estas pli ol la internacia, bv. indiki kiun parton vi retenas por landa agado.

Nuna estraro de la sekcio:

Zsófia Kóródy (prezidanto), Dr. Rudolf Fischer (vicprezidanto), Christof Krick (kasisto), Martin Ptasinski (estrarano). La aktualaj adresoj estas sur la asocia hejmpaĝo

Laŭeble aldonu retadresojn, adresojn kaj funkciojn. **Mandato-periodo, tempo de la sekvaj elektoj:**

Elektoj okazis en majo 2016 en München, dum la jarĉefkunsido. Tiam pro demisio de estrarano Karin Klose, nova estrarano, Martin Ptasinski estis elektita. Sekva elekto: Pentekosto 2018

La mandato de la komitatanoj daŭros ĝis marto 2018, daŭrigo de la mandatoj estis akceptita de la jarĉefkunveno la 23an de majo 2015.

=== Agado ===

6 ĝis 10 linioj da klarigoj bonvenas; ligoj al pli longaj raportoj bonvenas.

AGEI estas komunutila asocio, agadas por interkompreniĝo de popoloj, eduko al paco kaj toleremo. La asocio helpas la lernejan kaj universitan instruadon de Esperanto, proponas internaciajn amikajn kontaktojn inter lernantoj de Esperanto, instigas al internacia interŝanĝo de lernantoj, zorgas pri trejnado de Esperanto-instruistoj, ellaboras kaj disvastigas esperantajn instru- kaj ekzamenmaterialojn, rekomendas lingvajn ekzamenojn ankaŭ laŭ internaciaj normoj, kunlaboras kun similaj internaciaj fakorganizaĵoj, estas alparolpartnero por la ministerio pri edukado rilate al Esperanto-instruado.

AGEI organizas fakajn kunvenojn, instigas al verkado de fakaj artikoloj kaj fakliteraturo, donas fakajn servojn al siaj membroj.

Gravas ankaŭ la konsultado pri instruagado, metodika-didaktika helpo al gekolegoj, spertinterŝanĝo pri lerneja kaj eksterlerneja Esperanto-instruado.

Propraj aranĝoj dum 2016:

Kelkaj instrurilataj eventoj okazis en 2016.

1. TORPEDO 11 (septembro 30 - oktobro 3, 2016) la Tradicia Oktobra Renkontiĝo PEDagogia (samtempe 75a studsesio) okazis en Herzberg am Harz – la Esperanto-urbo, organizita de la Filio de GEA por Klerigado kaj Kulturo kaj AGEI, Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj.

Ĝia ĉefcelo estas oferti fakan spertiĝon kaj spertinterŝanĝon pri lingvoinstruado kaj specife pri Esperanto-instruado, ebligi traktadon de ĝenerale uzataj kaj uzeblaj instrumentoj, informado pri en- kaj eksterlandaj fakaj eventoj, interesaĵoj, sciindaĵoj el la Esperanto-movado.

Tiu tradicia evento fariĝis denove internacia pro partopreno de invititaj prelegantoj Sara Spano (estrarano de UEA), Francesco Maurelli (reprezentanto de Kosmo, ellaboranto de internaciaj projektoj), Eva Fitzelova kaj Johannes Mueller (redaktoroj de la reta radio Kern.punkto.info).

La kvartaga seminario havis ĉiutage alian ĉeftemon, do estis

1. Tago de observado: raportoj pri instruperto kaj instruilataj movadaj eventoj, trejnebloj (enkonduka prelego, diskutado pri instruado kaj kursmanaĝado, internacia kunlaboro por edukado, aktivula maturigo, trejnado (Sara Spano))
2. Tago de kursorganizado, internaciaj projektoj (seminaria metiejo: internaciaj projektoj, subvenciebloj, Erasmus+, Volontula Servo, TEJO (Francesco Maurelli))
3. Tago de komunikado (fakprelego: Modernaj interretaj komunikaĵoj, planado, produktado kaj publikigado (Eva Fitzelova kaj Johannes Mueller))
4. Tago de metodiko (fakprelegoj: trarigardo de internaciaj edukaj projektoj, lernebloj por plenkreskuloj, instruado per trarigardo de lernmaterialoj, gramatik- kaj lernolibroj, vortaroj, retaj kursoj. Lingolia: interaktiva retkurso. Seminaria metiejo: praktikaj konsiloj, spertinterŝanĝo pri la nova interreta klerigsistemo (Zsófia Kóródy, Peter Zilvar))

Pluraj metodoj estis traktitaj, analizitaj. La partoprenantoj povis studadi lernolibrojn kaj didaktikajn helpmaterialojn el la riĉa kolektaĵo de la biblioteko de Interkultura Centro Herzberg. Zsófia Kóródy prezentis plurajn memfaritajn instruhelpilojn kaj montris praktikajn ekzemplojn kiel utile uzi ilin. Peter Zilvar prelegis pri movadaj temoj kaj gvidis diskutadon pri kursoj, lecionoj al malsamaĝaj kursanoj.

Estis diskutoj ankaŭ pri alia aktuala temo: instruado per moderna teknologio, ja instruistoj devas respondi al la demandoj: ĉu niaj instrumetodoj kapablas sekvi la rapidan teknikan evoluon en la mondo? Ĉu ni povas reagi al la ŝanĝoj kaj bone utiligi novajn teknikilojn por Esperanto-instruado? Ĉu ni scias sufiĉe pri la novaj medioj, aparatoj, realaj kaj virtualaj eblecoj?

Aranĝoj de aliaj kie la sekcio aperis:

1. Dum la 93a Germana Esperanto-Kongreso en München (13-16.05.2016) AGEI havis sian jarĉefkunvenon. Ĝi estis publika kaj allogis multajn interesiĝantojn. Krom la asocia jarraporto kaj prezentado de planoj, temis ankaŭ pri raporto pri la t.n. studsesioj, kapabligado kaj pluklerigado de instruistoj, kiun realigas Germana Esperanto-Centro (GEC) en kunlaboro kun AGEI en Herzberg am Harz; pri la prilaborata modula klerigsistemo por instruistoj kaj lernejoj kaj pri internaciaj edukaj projektoj.

Novaĵo estis la prezentado de ĵus aperinta gramatiklibro kaj lernmaterialoj de Heike Pahlow, kiu kun helpo de AGEI kaj GEC-fakuloj ellaboris novajn helpilojn taŭgajn kaj por lernantoj kaj por instruistoj. Estas rekomendinde ankaŭ la retpaĝo www.lingolia.com, kie aperas elŝuteblaj kaj mendeblaj lernhelpiloj, ekz. kolora jarkalendaro kiel bildvortaro, ktp.

Menciindas ankaŭ la planataj lerniloj por infanoj: Lernu kun Mo, kun allogaj lernkajeroj, desegnaĵoj, ilustraĵoj.

2. En 2016 Zsófia Kóródy, prezidanto de AGEI partoprenis en la 101-a Universala Kongreso de UEA en Nitra, Slovakio, kie ŝi kontribuis al la programo de la Tago de Lernado kaj ĉeestis ankaŭ edukajn eventojn kaj fakprelegojn. Ŝi kontribuis ankaŭ al la instrukapabligaj trejnosesioj en la 49-a ILEI-konferenco en Nyíregyháza, kie ŝi reprezentis AGEI en la komitatkunsidoj. En la konferenca programo ŝi prelegis ekz. pri la planata reta klerigplatformo por instruista trejnado kaj pri la novaj lernmaterialoj de Heike Pahlow.

Propraj projektoj dum 2016:

AGEI kaj Interkultura Centro Herzberg (sub gvido de Peter Zilvar) iniciatis kunlaboron kun la t.n. Landa Plenkreskula Kleriginstitucio (Ländliche Erwachsenenbildung, LEB <https://www.leb-niedersachsen.de/>). Jam duan jaron daŭras tutjara kurs- kaj klerigprogramo kun variaj temoj,

prelegoj, prezentadoj, organizado de t.n. Interkulturaj Vesperoj. La agnosko estas grava atingajo, kiu ebligas montri la kulturperantan, edukon rolan de la internacia lingvo Esperanto.

Projektoj de aliaj en kiuj la sekcio kunlaboris:

Ni kunlaboris per faka konsilado kaj disvastigado de la projektmaterialo de Klaus Friese, kiu pretigis broŝuron kun la titolo: „1 leciono pri Esperanto“. Ĝia celo estas informi lernejanon pri Esperanto ekz. en leciono, kiam agas anstataŭanta instruisto. Tiu ne devas esti Esperanto-parolanto, ja la materialo estas laŭpaŝe prezentita kaj ne bezonas multan antaŭscion. Klaus Friese mem vizitis multajn lernejojn en Hamburg por informi lernejestrojn kaj instruistojn pri tiu 1-leciona materialo.

AGEI elektis alian vojon: ni sendis inform-afiŝon kaj varbilon pri tiu lernbroŝuro al konferenco de lernejestroj en Malsupra Saksio (Niedersachsen) kaj la ĉ.3-400 partoprenantoj ricevis ĉion en siaj konferencaj dokumentuoj.

La projekto fariĝis paŝo post paŝo ankaŭ internacia: krom la esperanta pretiĝis ankaŭ german-, angla- kaj franclingva versioj.

Vi povas trovi ilin ankaŭ ĉe: <http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=83839799>

AGEI kunlaboras kun la Esperanto-Centro en Herzberg en nova eŭropa projekto ERASMUS+, kies partneroj estas el Pollando kaj Slovakio. La celo estas klerigi novajn aktivulojn por la Esperanto-movado, kiuj ricevas krom la lingva kapablo ankaŭ movadan trejnadon. Ili planas trapasi KER-ekzamenon por pruvi siajn lingvajn kapablojn kaj per reciprokaj vizitoj al la projektlandoj ili ekkonas ties aktivulojn, klubojn, movadajn strukturojn kaj povos en la estonto pli facile orientiĝi en internaciaj medioj. Gravus por ili tia spertigo, rakontado, informado pri kulturaj eventoj, interesaĵoj, sciindaĵoj el la Esperanto-movado.

La unua projektevento okazis en Pollando, kie la trejnatoj krom sia intensa lingvokurso havis la eblon aŭskulti prelegojn de la Interlingvistikaj Studoj ĉe UAM kaj partopreni kulturajn programojn de ARKONES. La dua fazo estos en oktobro 2017 en Herzberg am Harz, kie la partnergrupoj kunvenos dum TORPEDO-12 kaj la lasta kunveno okazos en Slovakio en somero 2018.

AGEI-prezidantino Zsófia Kóródy estis invitita en oktobro 2016 por prelegi en la semajnfina seminario de Esperanto-Asocio Hamburg. Alia ĉefpreleganto estis Bertil Wennergren kaj la temo de la seminario estis Esperanto-gramatiko, specialaĵoj de la lingvo kaj ilia komprenado, instruado. Ĝi okazis en Schwerin kun ĉ. 20 partoprenantoj. Estas ĝojige, ke estis organizita tia seminario por lingva perfektigado kaj por kreado de uzeblaj materialoj por estontaj kursoj, ja la gramatikaj prelegoj estis registritaj kaj la edukaj filmetoj aperas jam en youtube.

Varba agado en Esperanto kaj naciaj lingvoj:

Bona tutlanda varbado estas la anoncoj pri Esperanto-kursoj en la programkajeroj de Popolaltlernejoj (VHS). Tiuj atingas plurajn dekmilojn da legantoj, familiojn, vastan publikon. Eĉ se poste ne realiĝos kurso pro manko de sufiĉaj partoprenantoj, la legantoj povas legi pri Esperanto kaj ekscii pri uzebloj de la lingvo.

Varbado Esperantlingva kaj germanlingva okazas per la gazeto de GEA Esperanto aktuell, tra naciaj kaj internaciaj dissendolistoj, per retpaĝoj, Facebook kaj alvokoj por membriĝo kaj ekz. dum grandaj Esperanto-renkontiĝoj, kongresoj enlandaj, dum studsesioj aranĝataj en Germana Esperanto-Centro/Interkultura Centro Herzberg.

ILEI preparis nacilingvajn varbilojn, ekz. por la reprezentiĝo en kunsidoj de UNESCO. La germanlingva traduko estas pretigita, estas je dispono por interesiĝantoj ĉe <http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652>. AGEI pripensas ĝian paperan eldonon.

Sekciaj kontaktoj kun ne-esperantistaj organizoj kaj projektoj:

AGEI regule kunlaboras pere de pluraj siaj instruistoj kun popolaltlernejoj (VHS). En kelkaj urboj ankaŭ en 2016 aperis anoncoj pri Esperanto-lingvokursoj.

AGEI subtenas gekolegojn per kolektado kaj modelcela aperigo de varbtekstoj por tiuj kajeroj ĉe <http://agei.esperanto-urbo.de/page.php?pid=97868652>

Konata E-instruado en via teritorio:

Laŭ ricevataj informoj lerneja instruado okazis en Herzberg am Harz, Korbach kaj Buxtehude. AGEI ne mem listigas la kursojn, sed alvokas ĉiujn gekolegojn de bazaj kaj mezgradaj lernejoj, plenkreskulaj kursoj kaj studrondoj en universitatoj registri siajn kursojn kaj detalojn pri la instruado ĉe <http://edukado.net>.

Granda sukceso en universitatnivela edukado estas la lernogrupoj en Universitato Emden, kie en ĉiu semestro sub gvido de Sebastian Kirf dekoj da studentoj konatiĝas kun Esperanto kaj pluraj el ili elektas ankaŭ la sekvasemestran daŭrigan fazon.

Ankaŭ en Stuttgart kaj Wiesbaden okazadas universitataj Esperanto-kursoj gvidataj de Johannes Mueller kaj Martin Ptasinski.

Aliaj atingoj en 2016

Bona atingo en 2016 estis la akiro de nova bretaro por la dokumentujoj, arkivmaterialoj kaj la sukcesa kaj regula informado de nia membraro. Bedaŭrinde pro maljuniĝo kaj forpaso ni perdis plurajn membrojn, tamen la membronombro de nia asocio restas relative stabila.